Universala Esperanto-Asocio

Mesaĝo okaze de la Tago de la Angla Lingvo – 23 aprilo 2021

Dudek procentoj de la monda loĝantaro uzas la anglan lingvon kiel unuan, duan, aŭ aldonan lingvon. La angla ofte estas karakterizata kiel *la superrega* lingvo de komunikado internacia; tamen okdek procentoj de la monda loĝantaro ne uzas ĝin aŭ havas minimuman scipovon. Aŭtentike tutmonda komunikado bezonas vastan repertuaron de lingvoj por instigi dialogon, dissemi konon, kaj antaŭenigi daŭripovan evoluigon. Inkluziva komunikado estos pli grava ol iam ajn antaŭe dum ni alfrontas la komunajn defiojn de rekonstruado post KOVIM-19. La angla estas *unu* lingva ilo inter multaj. Ĝi povas kompletigi sed neniam anstataŭi aliajn lokajn kaj ĉefajn lingvojn de la mondo, inkluzive Esperanton, kiu estas lingvo kreita por antaŭenigi pacon kaj interkulturan komprenon. La tagoj de UN pri lingvoj celu konsciigi pri multilingveco kaj lingva diverseco. En ĉi tiu Tago de la Angla Lingvo UEA vokas la UN-komunumon kaj civilan socion konsideri la lokon de la angla en la multlingva ekologio de la lingvoj de la mondo.

Kanada Esperanto-Asocio
Esperanto-Asocio Brita
Esperanto USA
Esperanto-Asocio de Suda Afriko

23 aprilo 2021